

La heroo vivo de Henri Dunant, 6-a parto
Claude Gacond, 101-a radioprelego, 1964.11.04 & 07

Atentu esperantistoj ! Ĉi tie parolas la Svisa Kurtonda Radiostacio. Claude Gacond raportas pri la heroo vivo de Henri Dunant. Vi aŭdas la sesan elsendon.

En verko dediĉita al la Nobel-pacpremiitoj André François-Poncet, membro de la Franca Akademio, skribis : « *Mi ne kredas, ke en la eŭropa literaturo la realismo, la naturalismo plej precizema, inspiris paĝojn kompareblajn al tiuj, en kiuj Henri Dunant rakontas la abomenaĵojn de Solferino. Sen emfazo, sen literatura artifiko, neniel provante sin valorigi, sed laŭ maniero simpla kaj natura li naive kaj modeste diras tion, kion li vidis. Oni ne trovas similajn paĝojn ĉe Balzac, nek ĉe Stendhal, nek ĉe Tolstoj, nek ĉe Zola. Tiurilate la libro de Henri Dunant markas literaturan daton.* »

Estas menciinde, ke la fratoj Goncourt notis la 8-an de junio 1863 en sia tag-libro : « **Rememoro pri Solferino** estas pli impresiga, milfoje pli impresiga, ol Homero... pli impresiga ol ĉio ! » Karlo Dickens metis longajn citaĵojn de tiu **Rememoro pri Solferino** en sia legolibro **All the year round**.

Interesos la esperantistojn scii, ke **Rememoro pri Solferino** estas esperantigita. Sed bedaŭrinde tiu traduko estas jam delonge elĉerpita. Lastjare, kiam la Ruĝa Kruco muntis ekspozicion por celebradi sian centan jaron, ĝi serĉis unu ekzempleron de tiu traduko. Mi ne scias, ĉu ĝi fine trovis ĝin.

Rilate homaranismon tiu verko de Henri Dunant estas fundamenta dokumento, kiu neniam devus esti elĉerpita. Mi tre esperas, ke baldaŭ ĝi reaperos sur la esperanta libro-merkato, ĉar en ĉiu biblioteko de lernejo, kie esperanto estas instruata, simila libro, kiu kondukas al homaranismo, devus havi sian lokon.

Eble la esperantistoj ne komprenas la valoron de tiu ĉefverko, ĉar en la naciaj histori-libroj oni ĝin ignoras. Pro tio la liceanoj simple kvazaŭ neniam aŭdas paroli pri ĝi. Ĉar ni, homaranoj, ne ankoraŭ posedas eblecon studi nian humanismon per sistema instruado, ni malfacile emancipiĝas el la naciismaj penskutimoj. Kiel la naciistoj de nia propra lando, ni kutimas rigardi nur la eksteran aspekton de la okazaĵoj. Kiam ili plaĉas al nia nacia sento, tiam ni donas al ili enorman gravecon. Kiam ili signifas malvenkon, ni preskaŭ silentas pri ili. Ni kutimas al memflatemo.

La verko de Henri Dunant tiurilate estas absolute emancipiĝinta. Ĝi prezentas la realaĵojn de milito en plena lumo sen provi kaŝi parton de la realeco. Pro tio la naciistaj historiistoj, kiuj kutimas kanti la gloron de la batal-kampoj forgesante la kadavrojn, ne povas interesiĝi al verko, kiu montras, ke batalo antaŭ ĉio signifas buĉadon. Henri Dunant, la homarano, kaj la historiistoj naciistaj ne estas sur la sama ond-longeco. La ĝenevano vidis la krimon kontraŭ la homaro. La historiistoj celebradas la kuraĝon de la venkantoj kaj ĝenerale silentas pri la malvenkoj aŭ provas pruvi ilian malgravecon por la propra nacio.

Nia koncepto pri la historia disvolvigo estas venenigita per tiu partia edukado. Henri Dunant irante al Solferino, por renkontiĝi kun la imperiestro de la francoj, estis certa je la supereco de la Franca Imperio super ĉiuj aliaj landoj. Li estis alportanta al Napoleono la tria ĵus verkitan broŝuron, kiu ĝuste pruvis la neceson por la francoj konkeri la tutan mondon.

Ĝis Solferino estis la mon-avido, kiu estis la gvidanto de Henri Dunant. Ĉu tio, kion li skribis en tiu stranga libro pri la Roma Imperio, estis lia intima penso ? Estas dubinde. Ĝi estis nur rimedo por flatadi la imperiestron de la francoj, por provi ricevi de li la dezirindajn ter-hektarojn en Alĝerio.

Sed meze de batalantaj soldatoj, kie tiu stranga vojaĝo lin kondukis, nia negocisto subite komprenas je kiu prezo okazus tiu mond-konkero. Ĝis tiam, kiel naciisto, li vidis la bonon ĝis la limoj de la propra lando kaj la barbarecon ekster ĝi. Kiel franclingvano, por diri

La heroa vivo de Henri Dunant, 6-a parto
Claude Gacond, 101-a radioprelego, 1964.11.04 & 07

eksterlandano aŭ fremdulo, li kutimis uzi la terminon **strangulo**. La vorto *étranger* tion fakte signifas en la franca lingvo. De nun li vidos nur homojn, kiuj obeas al la samaj antaŭjuĝoj kaj pasioj. Li naskiĝis al nova koncepto de la homo. Li komprenas, ke neniu rajtas konkeri la najbarajn teritoriojn kaj ke la limoj inter la landoj nur estas cikatroj de interhomaj buĉadoj kaj malamoj.

Jam unu jarcento pasis post Solferino. Tamen malmultaj estas la homoj, kiuj emancipiĝis de la naciismoj. Veraj homaranoj, kiel Henri Dunant, tre maloftas. Zamenhof estis unu el ili. Pro tio estas konstatebla granda simileco inter la pensado kaj agmaniero de la kreinto de la Ruĝa Kruco kaj de la aŭtoro de nia lingvo.

Kiam enlanda civila milito dividas la loĝantojn laŭ du brutaroj, la veraj nacioj sentas sin ŝiritaj. Pro la amo al la patrujo ili ne kapablas aliĝi al unu el la partioj batalantaj. Ili suferas pro la malamoj, kiuj venenigas la rilatojn inter la nacioj. Post la civila konflikto oni agnoskas la saĝon de tiuj veraj patriotoj, kiuj ne lasis sin blindigi per sloganoj. Eĉ tre ofte civila konflikto solviĝas dank'al la arbitracio de unu el tiuj homoj, kiuj restis super la batalantaroj. Ĉiu lando havas en sia historio tiajn ekzemplojn de heroismo de kuraĝuloj, kiuj restis ekster la batalo malgraŭ la loĝantara nekomprenejo. La svisoj celebras ekzemple la meritojn de Nikolao de Fluo, kiu savis la unuecon de la lando, tio en la dekkvina jarcento.

Por mondano aŭ homarano kiel Henri Dunant, ĉiu internacia konflikto nur povas esti konsiderata kiel civila konflikto, kiu dividas samnaciojn. Tio, ĉar la homaro fariĝis por ili la vera nacio. Oni do komprenas, kial veraj homaranoj malgraŭ suferiga nekomprenejo kaj teruraj tentoj ne povas aliĝi al unu el la batalantaroj. Estus malfideleco al la sola vera obeenda patrio, la homaro. La verkisto Romain Rolland, kiam ekplodis la unua mondmilito, rifuĝis en Svislandon por aŭdigi sian faman alvokon **Super la batalantoj**. Li sin proponis al la Ruĝa Kruco kaj kun Hector Hodler kaj aliaj esperantistoj kaj kun centoj da veraj eŭropanoj. Kaj ili pruvis sian tutmondan patriotismon batalante kontraŭ la militspirito. Estis bela omaĝo al la spirito de Henri Dunant.

Ni multobligos la tekston de tiuj elsendoj pri la heroa vivo de Henri Dunant kaj ĝin sendos al la petantoj.

Vi aŭdis Radio-Svislandon. Claude Gacond diras al vi :

Ĝis reaŭdo !

-oOo-